



PILO-PRESS

Internacia
Informservo

Subtenu la
informan
laboron de
PILO-Press kaj
E N D

Eldonanto/Herausgeber:

Ludwig Pöckel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg 1
Tel. (09 11) 46 36 49; 51 42 69

N-ro 23/1976 - 7 jun 1976
Aperas ĉiusemajne

Poŝtflugo per la varmaera balono "Esperanto"

Balonpoŝtflugo okaze
de la bapto de l'unua varmaera balono

«ESPERANTO»



NO. C 0134 / 2500



AERPOŬTO
varmaera balono
HB-BEO
«ESPERANTO»

Ballonpostflug zum Anlass
der Taufe des ersten Heissluftballons

«ESPERANTO»

Esperanto Societo
Zürich

Der Pilot

g. Liechti *B. Rohr*

Zürich (pp) - Baldaŭ varmaera balono kun la nomo "Esperanto" propa-
gandos Esperanton laŭ la planoj de la Esperanto-Societo Zürich.
Balonpiloto estos Bruno Rohr el Svislando.

Por financigi tiun entreprenon, laŭ Esperanto-Societo Zürich, per la
balono estos transportataj leteroj, specialaj kovertoj en kvanto de
2 500 ekzempleroj (vidu la supran bildon!). La koverto surhavas
Esperant- kaj germanlingvan tekstojn "Balonpoŝtflugo okaze de la
bapto de l' unua varmaera balono 'Esperanto'".

Intertempe la Svisa Federacia Aer-Ofico en Bern konfirmis la matri-
kulan signon de la balono, kiu estas "HB-BEO". La koverto surhavas
ankaŭ la stampon: "Aerpoŝto varmaera balono HB-BEO -Esperanto-".

La prezo por la koverto kun speciala poŝtmarko kaj transportita per
la balono estas 6,- sfr. La koverto certe estas interesa filatelajo
kaj supozeble la prezo por ĝi en la daŭro de la jaroj plialtiĝos.
Mendojn oni direktu al: Esperanto-Societo Zürich, c/o F. Liechti,
Carl Spittelerstr. 167, CH-8053 Zürich. La koncernajn pagojn oni
sendu al: Kantonalbank von Zürich, Agentur Witikon, CH-8053 Zürich,
Poŝtkonto 80-3938. Dorsflanke de la enpagilo oni menciuj: Konto
Esperanto-Balono.

Pilo-Press en naciaj gazetoj

Nürnberg (pp) - Pli kaj pli ofte aperas informoj de Pilo-Press respektive de la germanlingva eldono END en naciaj gazetoj, tradukitaj de ĵurnalistoj.

Jam de jaroj la pola gazeto "Ilustrowani Kurier Polski" publikigas informojn el Pilo-Press.

"Esperanto-Informationen", gazetara servo de Svisa Esperanto-Societo en sia eldono de majo 1976 publikigis germanlingvan artikolon kun la titolo "Eine Esperanto-Nachrichtenagentur" (Esperanto-novajagentejo). Temas kompreneble pri Pilo-Press. Oni povas legi en ĝi i.a. "...Estas la Pilo-Press en Nürnberg....La Informoj estas uzataj de la Esperantogazetaro kaj de radiostacioj kun Esperanto-programo, sed ankaŭ regule tradukitaj en diversajn naciajn lingvojn..."

Pilo-Press-angulon publikigis la revuo "de post van holland", organo de "Nederlandsche Bond in Duitsland e.V.", redaktata en germana kaj Esperanta lingvoj (vidu la apudan eltranĉaĵojn). Redaktoro estas J. Aarse, Mandelstr. 14, D-4133 Neukirchen-Vluyn, kiu cetere estas esperantisto.

Esperanto-Kulturtagoj en Wels

Wels (pp) - Okaze de la 1 200-jarfero de la supra-aŭstria urbo Wels okazos de la 24-a ĝis la 27-a de junio 1976 Esperanto-Kulturtagoj sub honora protekto de urbestro de Wels, Leopold Spitzer.

El la programo: Esperanto-ekspozicio en Arbeiterkammer (Laborista Cambro), Wels, Roseggerstr. 8 (proksime de la stacidomo); Librostando de TRAMONDO.

Sabate, la 26-an de junio, 15-a horo, festa horo kun parolado de prof. d-ro Karl Beckmann, prezidanto de Aŭstria Esperantista Federacio, 16-a horo ĝeneralkunveno de Aŭstria Esperanto-Movado; 20-a horo prezentado de Esperanto-sonfilmoj; 22-a horo amika kunestado en "Bayrischer Hof", Dr. Schauerstr. 23.

Informojn donas: Esperanto-grupo de Wels, S-ro Ernst Moser, Stadtplatz 47, A-4600 Wels, Aŭstrio.

Diskutkunveno pri Eŭropa Lingva Problemo

Darmstadt (pp) - Vendrede, la 25-an de junio 1976, okazos en Darmstadt, restoracio "Zum Ziegelbusch", Kranichsteiner Str. 183, diskutkunveno, en kiu politikaj partioj, kiu kandidatas por la venontak elektoj al la germana federacia parlamento, laŭ la organizantoj, Esperantogrupo Darmstadt, reprezentantoj de la partioj eldiru la opinion de la partio pri la lingva problemo en Eŭropo.

Okazu diskuto pri la partiaj eldiroj kaj pri aliaj problemoj.

Pilo-Press

*Esperanto (End)
Nachrichten-Dienst*

Ehrenkomitee für Esperanto-Kongress

Düsseldorf (end) - Ausser Ministerpräsident Heinz Kühn haben sich drei weitere deutsche Politiker bereit erklärt, dem Ehrenkomitee des Europäischen Esperanto-Kongresses an Ostern 1976 in Eindhoven beizutreten:

Jürgen Girsogen, Düsseldorf, Kultusminister des Landes Nordrhein-Westfalen.
Prof. Dr. Fritz Burgbacher, Bonn, und Walter Brendt, Mitglieder des Deutschen Bundestages und des Europäischen Parlaments.


Aus den Niederlanden erklärte sich Mr. K. van Rijckevorsel, lid v.d. Raad van State, bereit.

Schulversuch „Esperanto in der Grundschule“

Hannover (end) - An dem Schulversuch des Internationalen Verbandes der Esperanto-Lehrer „Esperanto in der Grundschule“ beteiligten sich in Niedersachsen die drei Schulen Dollbergen, Frobeschule Peine und Balge. Weiter nehmen schulen in Belgien, Frankreich, Griechenland und der Niederlande teil. Insgesamt lernen im Rahmen dieses internationalen Schulversuches 336 Kinder Esperanto.
In Paderborn und Umgebung nehmen gegenwärtig 23 Schulklassen am Esperanto-Unterricht teil.

Eldonanto Herausgeber:

Ludwig Pichel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg 1
Tel. (0911) 46 36 49; 51 42 69



Nova Eŭropo

Internacia Premio pri Poezio

Milano (pp) - La Poeta Rondo de la Federaciiista Movado Senpartia "Kavaliroj por Eŭropo" lanacas la unuan eldonon de la

INTERNACIA PREMIO PRI POEZIO

"Nova Eŭropo"

rezervita al poetoj el ĉiuj eŭropaj nacioj.

Konkursaj lingvoj:

Itala (Memorialo Salvatore Quasimodo)

Franca (Memorialo Francois Chazai)

Esperanto (Memorialo Kalomano Kalocsay)

Konkursaj sekcioj:

a) por unu aŭ du poemoj, libertemaj, neeldonitaj, originalaj

b) por unu aŭ du poemoj, temo fiksita: "Por Eŭropo", neeldonitaj.

Ĉiuj poemoj, klare tajpitaj aŭ fotokopiitaj, en kvar kopioj, el kiuj nur unu devos surhavi nomon kaj adreson de la aŭtoro, devos esti

senditaj al: Annalisa Bordina "Kavaliroj por "Eŭropo"

Via Napo Torriani, 28, I-20124 Milano, Italio,

ĝis la 15-a de julio 1976.

Partoprenkotizo 3.000 italaj liroj, sed por partoprenantoj el landoj kun transpagaj problemoj la partopreno estas senkotiza.

La juĝkomisiono por la lingvo Esperanta estas: Tazio Carlevaro, lingvisto (prezidanto); Giordano Azzi, filologo; Aldo de Giorgi, poeto.

1-a Internacia Esperanto-Kampado en GDR

Berlino (pp) - En la tempo de 5-a ĝis 18-a de septembro 1976 okazos Internacia Esperanto-Kampado (tendumado) sur la kampadejo "Inter-camping Krossinsee" ĉe Berlin, ĉefurbo de GDR.

La kampadejo troviĝas ĉ. 90 minutojn for de la centro de Berlino. Ekzistas bonaj eblecoj akvosporti, ripozi, ekskursi ktp. La esperantistoj de Berlino preparas riĉan kaj varian programon kaj prezentas i.a. prelegojn, esperantlingvajn filmojn, organizas ekskursojn, konversacian kurson kaj diversajn distrajn aranĝojn.

Oni nepre konsideru, ke ĝenerale temas pri kampado en tendoj. Partopreni povas ĉiu esperantisto el GDR kaj el la eksterlando, kiu alveturos kun propra tendo! Loko por starigo de propra tendo kostas por tagnokto 4 markojn (GDR). En limigita kvanto estas je dispono lignaj meblitaj kabanoj. Unu loko en la kabano por tagnokto kostas 8 markojn. Aŭtomobila parkloko por tagnokto kostas 1 marko.

Kiel ĝenerale sur tiaj kampadejoj ĉiu zorgos mem pri la manĝoj. Sur la kampadejo kaj en ties proksimeco troviĝas restoracioj kaj vendejo.

La programkotizo kostas 12 markojn. Ĉiuj pagoj por la tranokto kaj kaj kotizo okazu nur surloke.

Limdato por la aliĝo: 1-a de julio 1976. Informoj kaj aliĝiloj haveblas ĉe: Centra Laborrondo Esperanto en KL, Charlottenstr. 60, DDR-108 Berlin.

Mallongaj informoj

Francio. Dum Eŭropa Festo en Labuissière (26.-30.5.76), junaj esperantistoj francaj organizis 4-tagan Esperanto-ekspozicion en la junulardomo. Inter la eksterlandaj gastoj troviĝis esperantistoj el Belgio, Nederlando kaj M. Ries, prezidanto de Luksemburga Esperanto-Asocio.

Fine de majo, la "Pariza Esperantista Teatro" prezentis sukcesan spektaklon en Antverpeno, Bruselo kaj Lieĝo. El la programo menciindaj estas: "La bela indiferentulo" de Jean Cocteau, kaj komedio de Florian "Du biletoj". (lgx)

Salutoj el Pollando

Andreo Pettyn, redaktoro de Pola Radio, sendis jenajn salutojn:

"Kune kun grupo de laŭreatoj de konkurso sindikata de la Pola Radio mi salutas vin kaj la legantojn de Pilo-Press. Kune kun mi estas Zdena Matykova (Ĉeĥoslovakio) kaj J. Csapo (Hungario), ambaŭ esperantistinoj."

Vizitaj sekvoj

D-ro Josef Kondor, kiu pasintsemajne restadis kun lernantoj kelkajn horojn en Nürnberg, skribas i.a.:

"Viajn prospektojn kun Esperanto-gramatiko ktp. vigle studadis miaj lernantoj en la vagonaro kaj kelkaj eĉ demandis min pri Esperanto. Do, kiel vi vidas, estis utila via veno kaj ni nur esperas, ke la semo elkreskos kaj portos fruktojn! La belegajn, valorajn unuataĝajn kovertojn, bk-ojn, ili diligente serĉis ĉe mi dum la vojaĝo kaj fieras nun pri ili, ĉar ili estas vere maloftaĵoj, almenaŭ en ĉi tieaj rondoĵoj. La reston mi transdonis al Patro Richard Ott, kiu gvidas la porleprulan agadon en nia gimnazio."

Esperanto en Radio

Varsovio. En la Esperanto-Ekspresso oni povis aŭdi intervjuon kun Detlev Blanke, sekretario de Centra Rondo Esperanto de GDR, pri la planoj kaj perspektivoj de la nova CED sub gvido de J. Pool, Ulrich Lins kaj Detlev Blanke. Oni raportis pri la Internacia Esperanto-Renkontigo okaze de la Tagoj de Bydgoszcz (Vidu PP n-ro 22/76, p.2!), sed kial ĉi-foje ne ĉeestis redaktoro kun la mikrofono?

Oni povas diri, ke meznombro la Varsovia Esperanto-Redakcio ricevas semajne ĉ. 100 korespondadojn. Dum majo alvenis pli ol 500; kompare al la pasintjara majo tio signifas kreskon je pli ol 100 korespondadojn.

Vieno. Ĉi-foje la Viena elsendo estis pli malbone aŭdebla, sed tamen lerta aŭskultanto povis sekvi ĝin: la semajnan komenton de d-ro Alfred Macher kaj la artikolon pri la urbo Wels.

Svisa Kurtonda Servo. D-ro A. Baur prezentis al la aŭskultantoj la libron "Plansprachen" (Planlingvoj), aperinta antaŭ nelonge en FRG. Lia renzo estis favora, sed kelkaj kontribuoj laŭ li havas nur historian valoron.

Ge-sroj Gacond komencis novan serion da prelegoj, kiujn oni povas nomi prelegoj pri Esperanto-sociologio. Kio estas Esperanto-socio? Laŭ Gacond: "Tuto da esperanto-uzantoj" aŭ "Esperanto-uzantaro". Krome Gacond opinias, ke la vortoj Esperanto-movado kaj esperantistaro kovras realecojn malpli vastajn ol tiun, kiun entenas la vorto Esperanto-socio.

La prelegoj estos publikigataj en la Monata Cirkulero de Kultura Centro Esperantista. Oni atendas ĝis kut kontribuojn.